# TEJO-aktuale: numero 128, 2003-12-08

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 128 (08 decembro 2003)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. MARTA SUBKONTINENTA KONGRESO - PRETORIA, SUDAFRIKO
2. TOGOLANDA ESPERANTO-KONGRESO - ANEHO, TOGOLANDO
3. ESPERANTA VIKIPEDIO NUN ENTENAS 10 000 ARTIKOLOJN
4. FONETIKA EKSPERIMENTO EN ESPERANTO
5. TEJO-AKTUALE TRANSLOKIĜAS AL ABONU.COM

---

## 1. MARTA SUBKONTINENTA KONGRESO - PRETORIA, SUDAFRIKO

La Esperanto Asocio de Suda Afriko = EASA, invitas vin al sia MASUKO (Marta Subkontinenta Kongreso] en Roodeplaat, apud Pretoria, Sudafriko, inter 19-23 marto 2004. Ni restados en la Roodeplaat Trejn-Centro (RTC), kiu situas ĉe la Roodeplaat Akvobaraĵo, 27 km norde de Pretorio. La programo ankorau estas preparata, sed enhavos interkonan vesperon, promenojn kaj akvosportojn, kantadon, filmvesperon, komputilumadon, movad-rilatajn kaj aliajn prelegojn kaj diskutojn, kaj la EASA-Jarkunvenon.
- vonblottnitz@icon.co.za

---

## 2. TOGOLANDA ESPERANTO-KONGRESO - ANEHO, TOGOLANDO

La nacia esperanto-movado UTE (Unuiĝo Togolanda por Esperanto), informas vin pri la baldaua okazigo de la 11-a Togolanda Esperanto-Kongreso pri la temo: "Kiel reorganizi nian landan movadon?". La kongresloko estas la iama ĉefurbo de Togolando: Aneho, je 45 kilometroj de Lome, 2 kilometroj for de la landlimo inter Togolando kaj Benino. Ni kongresos dum 27-29 decembro 2003. - afriko.oficejo@uea.org

---

## 3. ESPERANTA VIKIPEDIO NUN ENTENAS 10 000 ARTIKOLOJN

La esperantlingva fako de la multlingva kunlabore rete verkata enciklopedio 'Vikipedio' atingas dek mil artikolojn c'iutage verkatajn de kunlaborantoj el pli ol 30 landoj. Vikipedio estas multlingva projekto kun pli ol 300 000 artikoloj en pli ol 40 lingvoj. Artikoloj samtemaj en diversaj lingvoj estas simple interligitaj tiel ke leganto povas facile transiri de unu lingvo al alia kaj de unu temo al alia. Estas unika s'anco por Esperanto esti agnoskita kiel monda kleriga kulturlingvo. Ankau' vi povas ekkunlabori en tiu senprecedenca projekto. - http://eo.wikipedia.org

---

## 4. FONETIKA EKSPERIMENTO EN ESPERANTO

Internacia eksperimento, kiu celas priskribi kaj taksi la prononcon en Esperanto, estas grava parto de verkata disertacio pri la norma prononco de nia lingvo internacia, fare de Oksana Burkino, postdiploma studentino ĉe Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato (katedro pri generala lingvistiko).
Ŝi petas, ke ĉiuj, kiuj ekdeziras partopreni, dediĉu iom da minutoj por

tiu ĉi serioza esploro. - http://sfo.ab.ru/~oxy/

---

5. TEJO-AKTUALE TRANSLOKIĜAS AL ABONU.COM

Pro teknikaj problemoj ĉe esperanto.org TEJO-aktuale plene translokiĝis al Abonu.com. Atentu, ke ekde nun ĉiuj antauaj retadresoj de TA ĉe esperanto.org ne plu estas validaj. Kontakti la redakcion de TA nun eblas per <aktuale-red@tejo.org> .

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij Gaus, Giuseppe Castelli, Chuck Smith.
Tiun chi numeron redaktis Chuck Smith.